**N I A   V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**NOVEMBRO 2007**

**ZAMENHOFA TAGO EN MADRIDO**

15-an de decembro, sabate, je la 14,00h

Restoracio Candilejas II (Str. Candilejas 32- Vallecas)

Proksime al Asamblea de Madrid. Aŭtobuso 57 ekde la stacio de Atocha, haltejo Eroski. Renfe-stacio "Asamblea de Madrid-Entrevías".

Metroo Portazgo (15 min piede)

Proksimuma prezo 22 eŭroj.

Bv antaŭmendi lokon kiel eble plej frue al Pedro A. Hernández: Tel: 91 223 48 53

( portebla 667 721 951 – retadreso: esperantio@ono.com )

## LOGOTIPO POR UEA-2008

Guillem Sevilla, grafika desegnisto de Barcelono, membro de Kataluna Esperanto-Junularo, gajnis la konkurson pri simbolo por la 100-jariĝo de UEA, festota en 2008. Partoprenis 19 aŭtoroj el 12 landoj. Kurioze: la logoo estas tre simila al tiu de Telemadrid.

## TRA LA MONDO

**Astura Esperanta Asocio** havas provizoran paĝaron; ĝis la definitiva aranĝo de la koncerna enir-paĝo, oni povas aliri al ties materialoj tra la ret-adreso: http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/ Ene de tiu Interret-paĝo, inter aliaj materialoj, troviĝas ankaŭ la ĝis nun publikigitaj numeroj de ĝia Informilo kaj la lastaj numeroj de ĝia revuo HELECO.

La Nobel-premiito Reinhard Selten **pledis por Esperanto** en ”pola Davos” Kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation, la japana mecenato Etsuo Miyoshi, kaj UEA, ĉi-jare Eŭropa Esperanto-Unio forte reprezentiĝis ĉe la prestiĝa ekonomia forumo en la pola urbo Krynica.

**Augusto Casquero** prelegis en la ĉina urbo Foshan, en la "Faklernejo pri Aŭtomobila Meĥaniko", pri Esperanto en Esperanto, kun samtempa tradukado al la ĉina lingvo. Partoprenis ĉirkaŭ 200 junaj gelernantoj. Post la prelego oni projekciis la videofilmon "Ie en Ĉinio", de Roman Dobrzynski, kaj muzikan videon de koncerto de Jomo en Pollando. La lernejo organizos e-kurson al kiu aliĝis ĉirkaŭ 50 gelernantoj.

Eŭropa Esperanto-Unio sukcesis prezenti esperanton kaj lingvopolitikan demandon dum la grava orienteŭropa aranĝo **"Ekonomia forumo"**

Angelita Sanz partoprenis en la **15-a Internacia Esperanto-Semajno** de la Kulturo kaj Turismo en Tossa de Mar (Girona)

## HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La oficejo de HEF deĵoras persone lunde inter la 17,30 kaj la 20,00 horo. Dum aliaj tagoj kaj horoj vi povas telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es , sed atendu char vi ricevos respondon la sekvontan lundon.

**Estrarkunveno 17-09-2007:** Inter aliaj aferoj oni aprobis akcepti demision de Fernando Moral kiel ĉefdelegito de UEA. Li daŭrigos la laboron ĝis trovi novan inter la nunaj delegitoj. La ĉefdelegito ne necesas esti peranto de UEA. La reklamo jam aperis en la forumo esperanto-aktivado. Oni aprobis ke la kotizo por la jaro 2008 estos 31 eŭrojn por membroj kaj 62 por kolektivaj membroj.

**Hispana Kongreso 2008**. Okazos en **Cuenca**. inter la 3-a kaj la 6-a de julio. Alejandro Pareja, Prezidanto de LKK, atendas oficialan respondon rilate kongresejon kaj malmultekostan loĝejon. La aliĝilo estos disponebla antaŭ la fino de la jaro (kotizo 30 eŭroj, 25 por HEF-anoj).

Post la eksiĝo el HEF de Darío Rodríguez, pro personaj motivoj, la nova moderatoro de la **forumo HEF-anaro** estas Manolo Parra.

Toño del Barrio atendas komentojn al la unua malneto pri la **projekto por venontaj du jaroj 2008 kaj 2009**, profitante la datrevenon respektive de UEA kaj de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, kaj la proklamon fare de Unuiĝintaj Nacioj de la "Internacia Jaro de la Lingvoj". La estraro de HEF donis la unuan apogon al la Projekto. Kontakt-adreso: tonyodelbarrio@gmail.com

.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Post la feria periodo, la lundaj konversacia-rondoj kiun organizas Madrida Esperanto-Liceo daŭre okazas ekde la 17-a de septembro, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 . Tel. 91 446 80 79.

Ĉiulunde okazas malferma konversacia rondo je la 18,30.

12-an de novembro je la 18,30: "Sur la ekrano: la dvd Esperantio"

Carmen Suárez, kiel Sekretariino de HEF, profitante la oferton de la Madrida Urbodomo al kulturaj asocioj, cheestis kurson pri **asociaj fiskecoj**. Ankaŭ private ŝi partoprenis en kurso pri **protektado de datumoj,** tre utila por la datumbazo de membroj de niaj asocioj. Se iu havas dubojn rilate al tiuj temoj demandu al ŝi ĉar eble ŝi povas solvi ilin. Kontakt-adreso: admin@esperanto.es

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid